

Christer Kiselman

KISELMAN, Christer (svedo, 1939) - Doktoriĝis pri matematiko en la Universitato de Stockholm, 1966, Prof. pri matematiko ĉe la Universitato de Uppsala, Prezidanto de la Sveda Nacia Komitato pri matematiko. Prof. ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino; ĝenerala sekretario de la Akademio Comenius; membro de la "Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna". Ekde 1999 li redaktas la revuon Esperantologio/ Esperanto Studies.

# La Fondo de Akademio Comenius

La 12-an de aprilo 1986 nova scienca akademio estis fondita en Kopenhago: *Internacia Scienca Akademio Comenius* (mallonge *Akademio Comenius*). Ĝiaj iniciatintoj estis Paul Neergaard kaj Ivo Lapenna, kiuj estis elektitaj kiel prezidanto respektive vicprezidanto. Kune fondis la akademion 32 sciencistoj.

La celoj de la akademio estas i.a. iniciati, kuraĝigi kaj konsili pri efektivigo de sciencaj esplorprojektoj kaj establi kunlaboradon kun aliaj sciencaj akademioj - do celoj de iu ajn akademio scienca. Sed krome ĝi havas la celon agadi kiel organo de sciencistoj de eminenteco por reprezenti la sciencistojn kiuj uzas la Internacian Lingvon. La aliaj du akademioj en Esperantujo, nome la Akademio de Esperanto (AdE) kaj la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino (AIS), havas aliajn celojn. Pri la rilatoj inter la tri akademioj, kiuj laŭ siaj celoj neniel konfliktas inter si, oni povas legi en *Aktoj de la Akademio* [de Esperanto] *III*, paĝo 20.

La akademio portas la nomon de Johann Amos Comenius (Jan Amos Komensky, 1592-1670), filozofo kaj fondinto de la pedagogio. Lin okupis la ideo pri disvastiĝo de civilizo helpe de artefarita lingvo. En *Via lucis* (La vojo

integro tutmonda